

Hermann Schmidt,
Fariĝas aŭtuno

tradukita de Manfredo Ratislavo

Blovas malvarme el la orient'
Super kamparo kaj maro la vent',
Kantas ĝemante tra l' griza malklar'
De la aero, samkiel la mar'.

Peze animon kaj koron nun ĝi
Premas, tristigas ja min tio ĉi.
Tamen kun ia tre forta dezir'
Tiras min al la vad-maro sopir'.

*Traduko de la Frisa poemo "Hat uur hārefst" de HERMANN SCHMIDT (*1901-11-10 – †1979-03-10) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-11-17.*

Arg-87-176 (2003-12-15 21:10:34)

La publikigo de la originaj frisa kaj germana versioj kaj de la Esperantigo okazas kun afabla permeso de sinjorino Ose Cohnen (Hebbelstr. 3, D-25980 Westerland/Sylt), la filino de la poeto. Ŝi donis al mi, Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff), en 2003-12-15 telefone la permeson de publikigo.